

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952

Numero 1

Januaro/Februaro 1971

MARIBOR – la urbo de la 23-a IFEF-kongreso

Ekonomia kaj kultura centro de nordorienta parto de Slovenio



En la nov./dec. numero de IF aperis mallonga historio pri la evoluo de jugoslavaj fervojoj. Vi tie legis, ke Maribor jam en la jaro 1846 estis ligita per durelpara fervojo sur la linio Vieno — Graz — MARI-BOR — Celje — Zidani most —

Ljubljana — Triesto (kaj Rijeka) kaj de Zidani most al Zagreb — Sisak. Direkto nordo — sudo. Nur malmultajn jarojn pli poste ĝi estis ankaŭ ligita en direkto oriento — okcidento, en la jaro 1860 per unurelpara linio Budapest — Čakovec — Pragersko — MARI-BOR — kaj en 1863 al Dravograd — Celovec (Klagenfurt) — Villach — Franzensfeste. En la sama jaro oni finkonstruis en Maribor la fervojan uzinon, riparejon por lokomotivoj kaj vagonoj. Tiu uzino estis en Maribor ĝis fino de la unua mondmilito la ununura konsiderinda granda entrepreno.

Kvankam fariĝis Maribor grava fervoja kruciĝurbo, restis la transportado de lokaj produktoj plejparte al rivero Drava, kie trafikis grandaj 22—28 tonelaj ŝalupoj (vino, arbofruktoj kaj ŝtalo el la uzinoj Prevalje kaj Ravne) kaj floroj (ligno el Pohorje). La ĉefa celo de la fervojlinioj estis tiam interligi la ĉefurbojn

de la monarkio Vieno kaj Budapest al havenurboj Rijeka kaj Triesto. Funkciis en Maribor kelkaj manufakturoj, po unu ledo kaj ŝu-fabriko, tri muelejoj por greno, sur Pohorje multaj vitraj-farejoj, sed ili estis pli malpli nur metiaj entreprenoj.

La industria revolucio atingis Maribor apenaŭ post disfalo de duobla monarkio Aŭstro-Hungario en la jaro 1918 kaj liberigo de slovena nacio. Tiam komenciĝis rapida ekonomia kaj kultura evoluo de Maribor kaj de ĝia loĝantaro. La malgrandaj entreprenoj ne povis pro tro malnoviĝinta metia labormaniero elteni konkurencon de la moderna industrio. Tial kelkaj ĉesis labori, la aliaj fariĝis ĝermoj de novaj industriaj branĉoj. Nun posedas Maribor lignaj-, ŝtalonkonstru-, elektroteknik-, ĥemi-, ŝu-, tekstil-, automobil- kaj aliajn fabrikojn, en kiuj mastrumas memstare la laboristaro, do la kolektivoj mem. Maribor fariĝis unu el la plej gravaj industricentroj de la lando. Pro 7 novaj hidro-elektrofarejoj sur Drava, tiu rivero perdis la signifon de akvo-trafik-vojo.

Simile evoluis ankaŭ la kultura vivo de la urbo. En la jaro 1851 estis konstruita la teatro, kies konstruaĵo ankoraŭ nun servas al la sama celo kiel drama kaj opera teatro. Al la kongresanoj ni povas jam hodiaŭ diri, ke ĝi prezentos al ili la slovenan folkloran komikan operon „Gorenjski slavček“. En la Kongresa libro kaj en la teatra kajero vi legos la enhavon kaj klarigojn de la scenoj. Pro postu-

loj de la ekonomio kaj de industrio oni fondis antaŭ 10 jaroj 7 novajn superajn lernejojn: la ekonomi-komercan, maŝin-, elektro-, ĥemi-, konstru-teknikajn, agromonian kaj stomatologian. Ekster tiuj Pedagogian akademion. Por ili oni konstruis ankaŭ novajn modernajn domojn. Antaŭ du jaroj ricevis la ekonomi-komerca supera lernejo la 2-an ŝtupon kaj fariĝis altlernejo. En la sama jaro ekfunkciis en Maribor Teologia fakultato. Oni atendas, ke baldaŭ la aliaj teknikaj superaj fariĝos altaj lernejoj. Krome funkcias en Maribor diversaj institutoj kiel dislokigitaj partoj de Universitato Ljubljana. Menciindaj estas la unika akvario, diversaj muzeoj, la studa kaj altlerneja biblioteko ktp. Mi ne forgesu mencii, ke Maribor estas urbo de „forma

viva“, kie famaj eksterlandaj skulptistoj de jaro al jaro dum la monatoj julio-aŭgusto faras modernajn monumentojn el ŝtalo-betono kaj starigas lin sur konvenaj placoj de novaj urbaj kvartaloj.

Nature, la evoluo de ekonomio kaj kresko de kulturaj institucioj multe plibonigis la vivnivelon de la loĝantaro, kiu kreskis de antaŭmilitaj 35 000 al nunaj 115 000. Tiom pligrandiĝis ankaŭ la urba surfaco, kreskis la nombro de loĝdomoj, individuaj kaj grandaj en socia posedaĵo. Certe estas la novaj ĉiuj pli modernaj kaj komfortaj ol la antaŭmilitaj . . .

Laŭ intereso kaj libera tempo la kongresanoj havos okazon multon viziti kaj vidi.

Ludoviko Prebil

Pri nia 23a IFEF-kongreso en Maribor ni informas:

1. Vi ne bezonas vizon por Jugoslavio, sed nepre validan pasporton.

2. La kongreskarto validos kiel senpaga vajaĝbileto en la 1a klaso sur la tuta reto de la jugoslavaj fervojoj dum la monato majo 1971 por fervojistoj, pensiuloj kaj familianoj de tiuj personoj, kiuj ankaŭ en propra lando havas limigitan rajton pri libera vojaĝo. Post la pago-aliaĵoj estos akceptataj plej malfrue ĝis la 30a de aprilo 1971-, vi ricevos la kongreskarton per poŝto. Ĝi estas persona kaj ne anstataŭebla en kazo de perdo.

3. Kotizoj por kongresano: 100 Dinar ĝis 31. 1. 71 kaj 125 Dinar poste. Vi povos pagi per poŝtkontanta mono aŭ je la bankkonto de LKK. Kurzo por 1 US\$ = DM 3,6344; 100 DM = 409,836 Dinar.

4. Rekomendinda trajno: D 88 Köln 23.25, Maribor 17.02 h.

5. Konstanta adreso: 23a Kongreso de IFEF, YU-62-000 Maribor.

6. Pri prospektoj vi povos skribi al: Jugoslawisches Verkehrsbüro, Goetheplatz Nr. 7, 6 Frankfurt/Main.

Datoj

- 27. 3. estraro- kaj distrikt-komissitoj renkontiĝos Frankfurt/Main
- 9. 4. ĝis 12. 4. 49a Germana Esperanto-kongreso en Nürnberg
- 31. 7. ĝis 7. 8. 56a Univerŝala Kongreso de Esperanto en Londono
- 31. 7. ĝis 6. 8. 44a S. A. T.-Kongreso en Parizo
- 25. 7. ĝis 31. 7. Internaciaj aŭtunas feriokurso en la marbordurbo Helsingør/Danlando
- 8. 10. ĝis 10. 10. GEFA-jarkunveno en Lübeck (distrikto Hamburg)

Esperantista Kulturdomo — Kulturaj aranĝoj 1971

- 4. 4. — 9. 4. = Deka Kultura Semajno
- 9. 4. — 16. 4. = Studsemajno
- 4. 7. — 25. 7. = Kulturaj Esperantistaj Semajnoj
- 25. 7. — 7. 8. = Kulturaj kaj Turismaj Ferioj
- 7. 8. — 14. 8. = Postkongreso de S.A.T.
- 15. 8. — 4. 9. = Studsemajnoj

Redaktfino por n-ro 2/1971 estas la 25. 3. 1971

In der Sowjet-Union gewinnt die Internationale Sprache an Sympathie.

In 11 Schulen ist Esperanto als freiwilliges Lehrfach aufgenommen. Der Minister für Volksaufklärung gab den Auftrag, in einem Lehrer-Seminar in Tallinn 30 Lehrer in Esperanto auszubilden. Ein Lehrer-Seminar in Litauen veranstaltet ähnliche Kurse. Die Kosten zahlt der Staat.

Demnächst erscheinen esperantosprachige Bücher. Die Sowjetische Staatsbahn (SDZ) gab in der bulgarischen Esperanto-Revue „Ripozoj“ eine ganzseitige Werbeanzeige auf.

Wann wird man bei uns erkennen, wie wichtig die Internationale Sprache als Völkerverständigungsmittel ist? _____ EK

Usona malliberejo akceptis novan arestanton.

Baldaŭ necesis tiri de li ĉiujn dentojn.

Mallongan tempon pli poste oni forprenis de li la apendicon.

Post akcidento oni estis devigata amputacii la dekstran brakon.

Iun tagon vizitis lin la ĉefo de la gardpersonaro en la hospitalo kaj diris al li:

„Mi avertas vin, Jackson, viaj ruzaj aranĝoj ne trompas min. popece.“

Mi trarigardis vin — vi volas fuĝi Tradukis E. Kruse

Faklingva Angulo

redaktita de G. Ritterspach
(Daŭrigo 4)

Ĉu vi deziras esti ĝisdata fervojisto? Certe jes. Kaj tiam vi legas fervojfakajn gazetojn kaj vi trovas tie multon pri **kontenera trafiko** kaj **kombinita kargotrafiko** (Container-Verkehr, kombinierter Ladungsverkehr), kun lavango da novaj, plej ofte angladevenaj terminoj. Kio do estas kontenero? Ni konsultu la plej novan Esperanto-vortaron Plena Ilustrita Vortaro: „paralelepipedo (quaderförmiger) aŭ cilindra ujo, por la manipulado, stokado, transportado aŭ paraŝutado (Fallschirmabwurf) de lozaj varoj, paketoj k. s.“ Kaj la Fervoja Terminareto (1966) difinis: „pakujo, fervojpropra frajtujo (kun radetoj) destinita por enteni sendaĵon kiu konsistas el pluraj aŭ multaj eroj, el ŝutaĵo aŭ fluidaĵo. Ĉefaj formoj: envagona kontenero (1 — 3 m³) kaj survagona kontenero (pli ol 3 m³)“. La ĉi-lastata difino jam ne estas plu komplete, tiu de PIV ne jam: tro haste evoluas la tekniko. Jen provo de laŭsistema prezento de la nun plej uzataj konteneroj kaj iliaj transportmedioj.

Envagonaj konteneroj (Kleinbehälter), kapacito 1 — 3 m³, medioj fervojo/vojo, kun malgrandaj radoj kaj timoneto (Deichsel), nur horizontale transkargeblaj, ne stakigeblaj (nicht stapelfähig).

Survagonaj konteneroj (Großbehälter, pa-Behälter), kapacito 6 — 16 m³, medioj fervojo/vojo, kun radetoj, vertikale kaj horizontale transkargeblaj, ne stakigeblaj Diversaj tipoj, ekzemple sentegmentaj, varmizolaj, por ŝutvaroj aŭ fluidaĵoj.

Transkonteneroj (Container, Transcontainer), kapacito 20 — 70 m³, medioj ŝipo/fervojo/vojo, nur vertikale transkargeblaj, 6-oble stakigeblaj, normmezuroj laŭ ISO en futoj. Diversaj tipoj, ekz. sentegmentaj, varmizolaj, kun subekipajo (mit Straßenlaufwerk), kargoplata kontenero = paledego (Großpalette, flat), cisternkontenero = Tankcontainer.

DB-internkonteneroj (Binnenlandcontainer der DB, Binnencontainer), kapacito 20 — 70 m³, medioj fervojo/vojo, nur vertikale transkargeblaj, 3-oble stakigeblaj, metraj mezuroj, kiuj permesas interne stivi (verstaufen) normmezurajn paledojn (Pool-Paletten) sen spacoperdo. Diversaj tipoj, ekz. sentegmentaj, kun flankaj pordoj, kun volvotegmento (Rolldach), kargoplata kontenero = paledego (Großpalette, flat).

Kamionkestaj kaj remorkkestaj konteneroj (Wechselaufbauten, Wechselkästen), 7 m aŭ 12 m longaj, medioj fervojo/vojo. Kiel la nomo diras, tiuj konteneroj servas post reltransporto kiel ŝarĝportaj kestoĵoj de kamionoj (LKW), de remorkoj (Anhänger) kaj precipe de duonremorkoj (Sattelaufleger). Per argano oni povas ilin transkargi sur vagonon aŭ ŝipon.

Pro nura kompleteco mi menciis ankaŭ la Iglu-konteneron (Iglu-Luftfrachtbehälter) uzata en aviadiloj. Fakte tio ne estas vera kontenero, sed kloŝo, kiu kovras grandan platpaledon. La tuto havas kapaciton de 10 m³, profilon de aviadila fuzelaĝo (Rumpf) kaj larĝecon adaptitan al tiu de la

aviadila ŝarĝluko (Ladefuge).

La kombinita kargotrafiko uzas transkontenerojn kaj internkontenerojn. La transkargado de tiuj grandaj transportujoj devas okazi en transkarga ĉefstacio (Binnenland-Terminal, Großumschlagplatz) aŭ transkargejo (Umschlaganlage), ekipita almenaŭ kun portika argano (Portalkran), movebla sur pneŭmatikoj aŭ reloj. La kontenerojn kapatas speciala kargilaĵo (Ladegeschirr) aŭ longaj brakokoj. Sur la specialaj platvagonoj por kontenertransporto troviĝas vertikale moveblaj rigliloj, kiuj enŝoviĝas en ingoĵon ĉe la angulo de la normmezuraj konteneroj. Por la voja transporto de envagonaj konteneroj servas speciala remorko kun malalta ŝarĝplato (Niederfluranhänger) aŭ ordinara kamiono. La vojtransporto de grandaj konteneroj necesigas specialveturilon (Container-Zustellfahrzeug), plej ofte en formo de nura ĉasio aŭ duonremorko (Sattelaufleger) plus remorktraktoro (Sattelschlepper).

Parencas transportsistemo al la kombinita kargotrafiko estas la remork-sur-vagona trafiko (Huckepackverkehr). Kompletaj duonremorkoj, remorkoj aŭ kamionoj kun remorkoj estas transportataj sur fervojaj platvagonoj, nuntempe inter 15 relvojnodoj de la federacia teritorio. Kuŝvagono ofertas ripozon por la ŝoforoj. Komparebla kun tiu fervoja/voja transportsistemo estas la ŝiptransporto „ŝipet-sur-ŝipa“ LASH (Lighter Aboard Ship), kie granda transoceana ŝipo anstataŭ konteneroj portas malgrandajn kargoŝipojn (Leichter), kiuj sur riveroj kaj kanaloj de la destinlandoj atingu siajn celojn.

Fervojaj novaĵoj

Germanujo

Varmaks-avertiloj priobservas apud la reloĵ en 50 gravaj lokoj la rapide preterveturantajn vartraĵojn kaj „palpas“ per infraruĝ-detektiloj la temperaturdiferencojn inter la radakslagroj. Jam 15grada temperaturlialtiĝo ekigas akustikan alarmon ĉe signalejo en distanco 6 — 7kilometra, tiel oni povas ĝustatempe haltigi la koncernen trajnon en flanka trako. La instalaĵoj, kiuj kostas procent mil markojn, ne nur konstatas la danĝeron, ili ankaŭ indikas ekzakte la pozicion la la varmasko en la trajno. Tio esence faciligas la necesajn kontraŭaĵojn.

Japanujo

La Japanaj Fervojoj (JNR) intencas konstrui novan ekspreslinion 9000 km longan laŭ la modelo de la Tokaido-linio. La nova relvojprojekto transverse kondukos tra la 4 ĉefinsuloj de la lando, tra subakvaj tunejoj inter la insuloj Honŝuo kaj Kjuŝuo okcidente, kaj al la insulo Hakajdo norde. Per tio oni volas konekti Tokion kun la urbaj aglomeraĵoj en la nordo, en la sudo kaj en la okcidento de la insulregno. La maksimuma rapideco sur la linio estos 250 km/h, la meznombra rapideco 200 km/h.

Sovetunio

La relvoj en Sovetunio ampleksas 134 000 km, el kiuj 30 000 km (t. e. 22 %) estas elektrizitaj. (Komparo pri elektrizado ĉe DB: 8 600 km, t. e. 30 %, ĉe ÖBB 2 890 km, t. e. 49 %.) En Sovetunio 80 % de ĉiuj varoj kaj 60 % de ĉiuj vojaĝantoj estas transportataj per relveturiloj. La transportkio de varoj en 1969 estis

2362 miliardoj da tunkilometroj.

Francujo

SNCF planas novan rapidtrafikan linion inter Parizo kaj Liono, sur kiu veturos novaj turbintrajnoj je rapideco de 300 km/h. La nova linio ne estos elektrizita, ĝi komenciĝos kaj finiĝos en la jam ekzistantaj relvoj. Jam 10 turbintrajnoj, konsistantaj el po 4 veturiloj, estas finkonstruitaj kaj nun regule trafikas inter Parizo kaj Ŝerburgo je komerca rapideco de 122 km/h, maksimuma rapideco 160 km/h. Lastdate oni mendis du turbintrajnoj kun po 5 veturiloj kaj povumo de 3760 kilovatoj, ili atingos la maksimuman rapidecon de 300 km/h.

Britujo

La Britaj Fervojoj ekuzos la decimalan monsystemon jam unu tagon antaŭ ĝia ĝenerala enkonduko, nome ek de dimanĉo, la 14a de februaro 1971. Per tio oni volas eviti longajn homvicojn antaŭ la ĝiĉetoj lundon matene, ebligante la aĉeton de abonbiletoj jam dum dimanĉo.

Ritterspach

5 jaroj Esperantokursoj en la popolaltlernejo de Schwelm

De januaro 1966 daŭre okazas Esperantokursoj en la popolaltlernejo de Schwelm. Kiel oni atingis tion kaj kia estas la sukcesco?

En la aŭtuno 1965 la tri esperantistoj el Schwelm, kiuj ĝis tiam nur partoprenis ĉe la monataj kunvenoj de la Esperantogrupo Wuppertal, decidis fondi propran grupon kaj enkunduki Esperanton en la popolaltlernejo. S-ro Kronshage transprenis la taskon de la instruisto. Pro tio ke Esperanto ankoraŭ ne estis sufi-

ĉe konata en la urbo, la lernintoj de la unua kurso prefere estis iamaj esperantistoj, konatoj kaj parencoj de la iniciantoj, ĉar minimume devis partopreni 12 personoj en kurso de la popolaltlernejo. Poste ni okazigis ekspoziciojn en la ĝiĉethalo de la ŝparkasejo kaj en montrofenestro, donacis Esperantolibrojn al la urba biblioteko, festis Zamenhof-vesperojn, la urbestro inaŭguris Zamenhofstraton en la urba centro k.t.p. Pri ĉio favore raportis la loka gazetaro.

Novaj interesuloj venis al la kursoj, aliaj restis for, sed entute la grupo de la fidelaj geamikoj malrapide kreskis, el 2 UEA-membroj fariĝis 3, el 1 IFEF-ano fariĝis 7 kaj SAT-ano restis unu. Krome ni havas kelkajn kursanojn, kiuj ankoraŭ ne apartenas al iu organizaĵo. La plej granda aranĝo en Schwelm estis la Zamenhof-vespero 1969, kiun ni festis kune kun GEFA-anoj kaj aliaj amikoj el la ĉirkaŭaĵo de Wuppertal. Triono el la 60 partoprenintoj venis el Schwelm. La hungara magisto Szegedi dufoje montris sian arton en la popolaltlernejo kaj en la orfhejmo de Schwelm. Ankaŭ aliaj amikoj el Hungario, Japanio, Hispanio kaj Turkio, parte eĉ plurfoje vizitis nin. 8 el ni vizitis Esperantokongresojn, 12 korespondas kun eksterlandaj esperantistoj, kaj 4 jam verkis gazetartikolojn. En 1969 oni eĉ publikigis 78 artikolojn pri Esperanto en la loka gazetaro.

Do, tio estas la rezulto de 5jara laboro por Esperanto en nia urbo. Kiu volas provi similan? Konsilon por solvi la financon problemon tiurilate donas H. Schindler, 583 Schwelm, Max-Klein-Str. 21.

Schindler

El la grupoj

Dortmund

Dortmund kaj Amiens festis la dekan jarrevenon de ĝemeliĝo. Pro tio la urbaj instancoj de Amiens invitis 700 personojn el Dortmund. Komence de la festaj tagoj la urbestro akceptis la gastojn en la urba kulturdomo la 11an de oktobro. Rondo de esperantistoj, inter ili ankaŭ membroj de GEFA, partoprenis la diversajn aranĝojn kiel gastoj de la loka grupo kaj en kadro de Nordfranca Ligo. Oni demonstris dum du tagoj, ke Esperanto estas la sola rimedo por flegi internaciajn kontaktojn. Helpe de s-ro Keuning, eksĉefurbestro de Dortmund kaj malnova esperantisto, estis konvena okazo por praktiki Esperanton dum la paca invado de germanoj en Amiens.

Unu semajnon poste vizitis alia grupo danajn esperantistojn en Fredericia. Por ekkoni la landon gvidis la gastojn danaj Esperantistoj per propraj automobiloj tra la ĉarma lando ĝis la Norda Maro. Venontan tagon festis la tuta rubo Fredericia la inaŭguron de la plej granda pendponto super la Malgranda Belto. Feste ornamenta la urbo aspektis, kiam frumatene la urbestro envitis la enloĝantarojn kiu rajtis ĝui senpagan matenmanĝon. Ĉirkaŭ 500 personoj akceptis tiun maloftan okazon en la urbdomo. Orkestro ludis gajajn melodiojn, kaj la junuloj dancis. La pontinaŭguron celebris posttagmeze la reĝa paro. Radio kaj televido elsendis tiun gravan enlandan eventon. Post la salutparoladoj de diversaj eminentuloj, interalie ankaŭ la trafikministro, trapasis la ĥonorgastoj kiel la unuaj la novan ponton. Post komuna vespero en la loka Espe-

ranto-grupo, kun diskuto pri similaj problemoj de varbado inter la ĝejunuloj, sekvis vizitoj al la regiono Jütland kaj insulo Fünen.

Frankfurt. Okaze de la Zamenhof-tago kunvenis la fervojista grupo la 11an de decembro en la kantina salono, kiu estis feste ornata per kandeloj kaj abio-branĉoj. Post bonvenigaj vortoj de la distrikta komisiito d-ro Lang memoriĝis s-ro Ritterspach ankoraŭfoje per ravaj diapozitivaj pri la pasinta IFEF-kongreso kaj precipe pri vojaĝoj al Firencio kaj Romo, metropoloj de la itala arto. Oni restis ankoraŭ kune por gaja babilado.

W. B.



Otto F. Denk

Gratulo.

Ĉiu konas la „ĉiamgajan“ s-anon Otto-Friedrich Denk, el la mondfama led-urbo Offenbach. Malgraŭ tio, ke la 7an de decembro 1970 li estis 70-jara, li aspektas ankoraŭ pli juna. Ĉiam li estis preta transpreni laborojn por disvastigi Esperanton, kaj speciale por GEFA li plenumis jam diversajn taskojn. Liaj amikoj kaj kunlaborantoj deziras al li sanon kaj bon-

farton ankaŭ estonte, gajan humoron, nerompeblan laborforton por nia komuna celo kaj multajn feliĉajn jarojn en la familia rondo.
GEFA

Zamenhof-festoj inter Hamburgo kaj Munkeno

En multaj germanaj lokoj okazis kunvenoj, festaj kaj senceremoniaj, okaze de la naskiĝtago de D-ro Ludwig Zamenhof kaj la Internacia Tago de la Esperanto-Libro dum la monato decembro.


Wuppertal/Schwelm Zamenhoffesto kaj GEFA-distriktkunveno.

La 13an de decembro okazis en la gastejo „Gut Röttgen“ apud la urbolimo inter Schwelm kaj Wuppertal la Zamenhofvespero de ambaŭ Esperantogrupoj, ligita kun la GEFA-jarkunveno de la distrikto Wuppertal. S-ro Kronshage el Schwelm malfermis la kunvenon. Nome de GEFA s-ro Graß salutis la 49 ĉeestintojn, inter kiuj estis 16 fervojistoj, kaj dankis al la reprezentanto de la BSW pro la financa donaco por la BSW-membroj inter la kunvenintoj. Por la Esperantogrupoj Wuppertal salutis s-ro Merkens, kiu ankaŭ prezentis muzikon per pianoforto. La ĉefprelego de s-ro Kronshage temis pri taskoj de UNO. Inter la prelego s-ro Hegenberg kaj f-ino Jira el Schwelm deklamis tezojn de U Thant pri ĉi tiu temo. En la paŭzo ni havis la eblecon rigardi Esperanto-libroekspozicion kaj aĉeti librojn. Post la vespermanĝo GEFA-anino Köhler montris siajn diapozitivajn pri la kongreso en Wien.

Ĉi-foje ni ne havis eksterlandajn gastojn, sed nia amikino Kimie Ozawa, kiu en septembro 1970 edziniĝis kun la brita UEA-deliĝito Markarian, sendis al

ni belegan japanan lanternon kiel premion por bona lernado kaj laboro por Esperanto en nia grupo. Ni donis tiun lampon al s-ino Köhler el Schwelm, ĉar ŝi fariĝis membro de UEA, vizitis la kongreson en Wien kaj skribis bonan artikolon pri tio. Tiu artikolo trovis grandan eĥon en la Schwelma gazeto kaj eĉ en Aŭstrujo. La vespero finiĝis kun tombolo kaj dancado de la junularo. La gazeto „Schwelmer Zeitung“ publikigis bildon kun teksto pri nia kunveno.

Schindler



Karl Bernhard

Distrikt-komisiito Mainz

En la jaro 1950, kiam mi ankoraŭ estis lernanto ĉe la fervojo, mi legis en fervoja fakgazeto (Der Eisenbahner) artikolon pri Esperanto. Mi tuj entuziasmiĝis pri tiu ideo, sed komence mi ne sciis, kie oni povas lerni tiun lingvon. En novembro 1951 mi trovis kontakton kun la Esperanto-grupo Ludwigshafen, kie mi nun partoprenis Esperanto-kurson, kiu ĵus estis komencata. Jam duonan jaron poste, en Majo 1952 mi vizitis, kiel mian unuan kongreson, la IFEF-

kongreson en Lindaŭ. Gis nun mi vizitis ses IFEF-Kongresojn kaj plurajn aliajn naciajn kaj internaciajn kunveneojn.

Vorbildliche Zusammenarbeit

Durch laufende Veröffentlichungen in den Tageszeitungen „Neue Presse“, Ausgaben Coburg und Lichtenfels, und im „Volksblatt“, Ausgabe Kronach, praktizierte unser Mitglied Alfred Wollbacher, Neuses (Bezirk Nürnberg) durch ausreichende Information über Esperanto und über die Arbeit unserer Vereinigung insbesondere. Der Gruppe „Kronacher Esperanto-Freunde“ gehören zahlreiche Mitglieder aus dem Raume Coburg, Lichtenfels und Kronach an. Dieser Kreis rühriger Esperantisten war es auch, der vor nunmehr vier Jahren in Kronach die ersten Esperanto-Kurse in der Volkshochschule ins Leben gerufen hat und seit dieser Zeit immer wieder eine ausreichende Anzahl Interessenten wirbt, um die Lehrgänge durchzuführen. Nach den Volkshochschulabenden treffen sich Teilnehmer und Gruppenmitglieder jeweils zu geselligem Zusammensein. Da ein großer Teil derer, die jeden Mittwoch zusammenkommen, einer oder mehreren Vereinigungen angehört, wird den Esperanto-Neulingen neben der Erweiterung ihrer Sprachkenntnisse das Anknüpfen neuer Verbindungen und damit die praktische Anwendung der Internationalen Sprache ermöglicht. Durch die starke Beteiligung der Mitglieder aus dem oberfränkischen Raum an internationalen und nationalen Veranstaltungen unserer Organisation werden die Früchte dieser Arbeit unter Beweis gestellt.

Über unsere Jahresversammlung in Darmstadt berichtete die „Neue Presse“ gleichfalls sehr positiv.

Unter der Überschrift „Wegen Esperanto war er politisch unzuverlässig“ berichtete die NRZ Opladen (Bezirk Wuppertal) aus Anlaß des 75. Geburtstag und des Festes der Goldhochzeit über den Lebensweg des ehemaligen Bezirksbeauftragten Alfred Dawid (siehe auch Bulteno 4/70). Mit bewegten Worten schilderte er dem Berichterstatter die unvergessenen Erlebnisse seiner Esperantotätigkeit zwischen den beiden Weltkriegen, die mit seiner politischen Verfolgung ein vorläufiges Ende nahmen. Nach seiner Übersiedlung aus Schlesien betreibt Dawid seit 1951 wieder aktiv Esperanto.

Bitte an alle Leser: Berichten Sie über Ihre Erfahrungen mit der Presse. Senden Sie uns Artikel über Esperanto und über unsere spezielle Arbeit. Soweit es möglich ist, werden wir über die Arbeit aller Bezirke berichten.



Wilfried Mester — Distrikt-komisiito Köln (vidu: 6/70 paĝo 6)

Diversajoj

La Italaj Stataj Fervojoj eldonis reklamilon en Esperanto sub la titolo „En Italio por viaj rendezuoj kun la suno“. Vi ricevos ĝin senpage, se vi skribos al: Direzione Generale F. S. — Servizio Affari Generali, Ufficio Pubblicità F. S. — Piazza Croce Rossa, I-1 Roma.

Aperis la Plena Ilustrita Vortaro

kunverkita de 60 diversaj kompetentuloj pri diversaj artoj, sciencoj kaj teknikoj, sub ĉefredaktado de prof. Gaston Waringhien, eldonita de Sennacieca Asocio Tutmonda = SAT, en la formato 15 x 20 cm, 1344 paĝojn, estas mendebla ĉe Esperanto-Libroservo Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 2, poŝteko 2113. La prezo estas 101,90 DM (pagebla ankaŭ poparte DM 20 monate).

Kurioze estas

ke, dum en Francio SNCF estas elcentraliganta la fervojajn direktojn, Germanio kontraŭe reduktas la nombrojn de siaj fervojaj direktoj . . . opinias kolego R. Motto en la organo de la franca IFEF-sekcio.

Televido-kritikon

faris kolego Peter Hermanns el Hagen, estro de tre vigla grupo, pri la ne-taŭgeco de sendaĵo „Replik“ (18. 10. 70). La pri-trakto pri supernacia lingvo estis tute unuaflanka sen ŝancoj por Esperanto. Eĉ ne unu esperantisto havis okazon paroli pri Esperanto. Malgraŭ tio la sendinto petis denove pri Esperanto-kurso en la tria programo.

Se vi deziras legi interesan Esperanto-gazeton, mendu la kvaronjaran revuon

„Hungara Vivo“ en Budapeŝt VII, Rákóczi ut 54 (Hungarujo)

Karaj germanaj gekolegoj, permesu al mi tiamaniere esprimi miajn la plej korajn dankojn por amika akcepto kaj zorgemeco dum mia restado en Germanio okaze de 14a GEFA-jarkunveno. Via jarkunveno montris al mi, kiamaniere estas eble plivigli laboron en nia juna fervojista Esperanta movado. Nome de la ĉeĥoslovaka sekcio de la fervojistoj Esperantistoj mi deziras al GEFA plensukcesan laboron en la plua laborperiodo.

Jiri Pištora, Ĉeĥoslovakio

Kiel mi esperantiĝis

raportis kolego Schmidt, unu el nia malnova asocia-rondo Nürnberg . . . En 1919 mi legis unuafoje la vorton Esperanto en iu stenografa lernkajero. Mi demandis mian kolegaron. Kelkaj jam konis la internacian lingvon. En 1921 mi frekventis kurson por komencantoj en la popolaltlernejo de Homberg / Niederrhein kaj restis ek de tiam esperantisto. Dum multaj kongresoj kaj renkontiĝoj mi provis la taŭgecon de tiu interkomprenilo.

Saarbrücken. En „Mitteilungsblatt“ (Informilo) de Sarlanda Asocio de Filologoj, novembro 1970, estis publikigita sur 7 paĝoj la germana traduko de la artikolo „La didaktika loko de la Internacia Lingvo en la sistemo de lernejoj studobjektoj“ de D-ro István Szerdahelyi (Internacia Pedagogia Revuo, n-ro 0). La artikolon tradukis Reinhard Hauptenthal, Instrukomisiito por Esperanto, Dudweiler.

Informanto: Pickel

Wuppertal/Hagen

La nova kluboĉambro nun estas la konverenco-ĉambro de la BSW-kantono de la Ga Hagen Hbf, Fehrbellnerstrato — 5 Minutojn for de la ĉefstacidomo Hagen Hbf. La kunsidoj estas ĉiun duan lundon monate. Se vi trapasas Hagen, skribu antaŭe al: Peter Hermanns, 58 Hagen-Vorhalle, Nöhstr. 35. Ĉiuj grupkunvenoj estas anoncigitaj en la tri hagenaj gazetoj kaj en „Veranstaltungskalender“ de la urbo Hagen.

Norda Prismo, kultura, socia, literatura revuo, eldonata kvaronjare sub la redaktado de Poul Thorsen, J. Stig Hansen, Magnus Groth, kaj la administrado de E. Frost, Ved Fortunen 16, 2800 Lyngby, Danl., jaron. 25 dan. kr.

Tiu revuo, aperanta nun jam dum 16 jaroj, traktis en sia plej nova numero 2/70, 84paĝa, kiel ĉiam bonege presita, riĉe ilustrita, unu specialan temon: la dana komerco, industrio, navigado kaj turismo. Diversaj aspektoj de la dana socio estas leginda enhavo kaj bela eksterajo. Norda Prismo estas modela, reprezentanta revuo, kiun disvastigi kaj ekspozicii estas utile por la esperantistoj kaj por Esperanto.

El:
„Interlingvistika Informa Servo“

Mallorca, Balearaj Insuloj. Kolora faldfolio, 10,5 x 21 cm. Eld. Turisma Ofic. Av. Jaime III, 56, Palma de Mallorca.

Die Anmeldescheine für den 23. IFEF-Kongreß in Maribor sind an die Bezirksbeauftragten verteilt worden. Anforderungen sind an die Bezirksbeauftragten oder den Sekretär unserer Vereinigung zu richten.

Estraro kaj komisiitoj de la unuiĝo Germana Esperanto Fervojista Asocio en la Sociala Organizo de Germana Federacia Fervojto

Stato: Januaro 1971

Estraro

Prezidanto: TBOI Brandenburg, Hbm Münster (Westf.); Baza 945/379 aŭ 1391

Vicprezidanto: BAmtm Gießner, Bf Herzberg (Harz); Baza 949/887/391

Unua sekretario: BOI Rösemann, BD Münster (Westf.) - V-Büro - V 58; Baza 945/2297

Dua sekretario: BHS'in Kruse, Sozialamt Frankfurt/Main; AA 511; Baza 955/3280

Redaktoro: BAmtm Graß, BD Wuppertal -T-Büro T 101-; Baza 946/468 aŭ 1407, privata adreso: 565 Solingen 11, Meteorstr. 13

Kasisto: BHS a. D. Jentsch, Bf Ober-Ramstadt ĉe Darmstadt

Apartaj komisiitoj

Lingvaj ekzamenoj: BOAR Dr. Lang, Pa bei der BD Frankfurt/Main; Baza 955/1501

Instruado: BOAmtm a. D. Jäger, 6 Frankfurt/Main, Felix-Dahn-Str. 6; poŝttelefono 515123

Fakterminaroj: BAmtm Ritterspach, ZVL Frankfurt/Main, AA 5525; Baza 955/2239

Junularaferej: BS Hegenberg, Bf Bredenscheid (Wuppertal); Baza 946/651/23

Biblioteko kaj gazetkolektado: BOI Rösemann, BD Münster (Westf.) - V-Büro - V 58; Baza 945/2297

Bulteno-dissendo: BOS Schindler, Bf Schwelm (Wuppertal); Baza 946/848/388

Arkivo: BOS Barmaneter, Bf Woringen (Schwaben - Bez. Augsburg); Baza 964/824/365

Distriktkomisiitoj

Augsburg: B. Arb. Schmid, Bww Augsburg; Baza 964/1745 aŭ 965/1318 (edzino Schmid)

Essen: BOAmtm Schnetzer, Bf Hamm (Westf.); Baza 944/807/391
Frankfurt/M: BOAR Dr. Lang, Pa bei der BD Frankfurt/Main; Baza 955/1501

Hamburg: BAmtm Lepke, BD Hamburg - B-Büro -; Baza 947/1581

Hannover: BHS Heimlich, Bm Soltau; Baza 949/850/127

Karlsruhe: BAmtm Hug, BD Karlsruhe - Ps-Büro -; Baza 953/5005

Kassel: BHS Tasler, BD Kassel - Ps-Büro Ps 82 -; 957/1258

Köln: BHS Mester, Ga Rheydt Hbf; Baza 943/882/75/105

Mainz: BAss Bernhard, Bf Frankenthal

München: Olokf Gißibl, Bw Garmisch-Partenkirchen; Baza 962/821/365

Münster: BAmtm Schrappe, BD Münster (Westf.) - P-Büro - P 2; Baza 945/1171

Nürnberg: BOS Müller, Bahnpostleiwache Bamberg, Bp-Posten Lichtenfels; Baza 966/844/388

Regensburg: TBOI Röder, Bf Regensburg - T-Büro - Th 8; Baza 965/1401

Saarbrücken: BOS Hauptenthal, Ga Saarbrücken Hgbf; Baza 956/5429

Stuttgart: BOI Kiefer, BD Stuttgart - Ps-Büro -; Baza 952/5625

Wuppertal: BAmtm Graß, BD Wuppertal - T-Büro T 101 -; Baza 946/468 aŭ 1407

Peto al la eksterlandanaj geamikoj!

Ĉi maldekstre ni komunikas la aktualan adresaron de la GEFA-estraranoj kaj de la distriktaj komisiitoj. Bonvolu korekti vian liston kaj eventuale ŝanĝi la preparitajn adresojn por garanti la akuratan akcepton. Se vi mem havas dezirojn rilate la akcepton de nia BULTENO, ni urĝe petas informi nian unuan sekretarion, s-ro Otto Rösemann.

Anonco

Tutkore ni dankas pro ĉiuj salutoj kaj bondeziroj, kiuj atingis nin, ĉefe la redakcion, okaze de la pasintaj festotagoj. Germana Esperanto Fervojista Asocio

Koresponddeziro

Josef Svoboda, Str. de Konst. Biebel 2312/44 Most II, ĈSSR deziras germanan korespondanton.

La esperantistoj dum la pasintaj jardekoj konsekvence varbis por la ideo de interkompreniĝo per internacia helplingvo. Ili estis la profetoj de la movado. La nuna generacio de esperantistoj jam estas la pioniroj de Esperanto en praktika vivo. Sed ili neniam forgesu, ke Esperanto ne nur estas rimedo por la ĉiutaga praktika vivo, sed ke ĝi estas eterne ligata al grandaj kaj altaj idealoj: al solidareco de la popoloj, al progreso de la homaro, al paco de la mondo!

D-ro Franz Jonas

Ŝtatprezidanto de Aŭstrujo
El: The British Esperantist

Renkontiĝo kun hungaraj esperantistoj

Franz Jonas en Budapeŝto

La ŝtatprezidanto de Aŭstrujo, D-ro Franz Jonas, en junio faris ofican vicon al Budapeŝto.

Dum honora aŭdienco en la Parlamento, al kiu estis invititaj ankaŭ la prezidanto kaj la vic-prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio, d-ro J. Mateffy kaj d-ro I. Bacsikai, la aŭstra ŝtatprezidanto ekvidinte la stelinsignon, amike konversaciis kun ili. Li aludis la iamajn personajn renkontiĝojn kun hungaraj espe-

rantistoj, en la jaro 1959, kiam li — kiel ĉefurbestro de Vieno — akceptis la 11an IFEF Kongreson.

(H. F. M.)

El: Heroldo

Für den, der Esperanto kann, sind internationale Beziehungen keine Schlagworte, sondern ein persönliches Erlebnis.

„Kulturaj Kajeroj“ alportas interesajn legaĵojn, diversstemaj, diversdevenaj kaj novajojn pri la Esperantista Kulturdomo „Grésillon -F-49 Bauge“. Provnombroj kontraŭ respondkupono.

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen 11, Meteorstraße 13. Druck / preso: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH., 8500 Nürnberg. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanto Fervojista Asocio.